

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 20/08/2020 Kvarcentnaŭdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



Entute **731,380** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **283,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **228,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **9,380** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro. 134



Kontraŭe al la etnaj lingvoj, kiuj ŝanĝas la radikon de siaj vortoj por ricevi alian, kvankam rilatan, vorton, en Esperanto oni kunmetas neŝanĝeblajn radikojn por fari rilatajn vortojn, ekz. "La forko de la ĝardeno" al "La ĝardenforko". Nur ĉe la agvortoj (verboj) oni povas elekti el ses finaĵoj, por ses malsamaj verbaj variaĵoj. Oni ne povas kombini verbon kun du el tiuj variaĵoj, kiel "Mi loĝisos aŭ loĝisu aŭ loĝuos en Melburno" Nek oni povas diri "Mi as loĝi en Melburno". Sed oni povas diri "Mi ŝatas loĝi en Melburno".

Kaj oni povas diri ankaŭ "Mi loĝis kaj loĝos en Melburno", mallongigite al "Mi loĝis/-os en Melburno".

(daŭrigota). **Marcel Leereveld.**



## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

**Roger Springer** Protekilo por la portanto **sed** ankaŭ por la proksimuloj



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## Estrarkunveno 2020-08-06



Venonta kunveno: jaŭdo 20-a de aŭgusto 2020.

Terry, Sandor, Jonathan, Indrani Jonathan, Heather

La estraro de AEA (Aŭstralia Esperanto Asocio)

Plej amike, **Sandor Horvath**

La finsemajno de la 15a- 16a de aŭgusto 2020 estis tre okupata por la esperantistoj ,pro la viruso, de ie ajn en la mondo . Unuflanke la Filipina Esperanto Junularo virtuale okazigis la unuan eventon de serio de eventoj cele celebri la 7 jariĝon de la asocio. Ĉiuj membroj, komencantoj aŭ progresintoj, prezentis erojn ĉu informajn ĉu distrajn . La rezulto estis bunta programo en gaja , malstreĉa etoso. Por ekscii pri la kalendaro de la sekvaj eventoj iru al la retejo > FEJ7-Jara : #PorNovaFEJ>.

Aliflanke kiel planite Trevor Steele prelegis pri Historiaj pandemioj kaj la sekvoj , donante al ni esperon ke la nuna pandemio ne atingos la katastrofajn detruojn de antaŭaj pandemioj kaj montrante ke ĉio rezultas en ambaŭ negativaj kaj pozitivaj sekvoj .



Anna Löwenstein vizitigis al ni la historian domon de Lordo Mansfield , Kenwood, nun senpage - lau la deziro de la donacinto- viziteblan. La enhavo de la domo estas kvazau muzeo , kun multaj pentraĵoj.



Klarigante pri ilia deveno kaj signifo , Anna bildigis al ni la vivon de la reprezentitaj homoj, iliajn sintenojn, spurojn sur la socio de tiu epoko.

Raportas **Franciska Toubale**



## Aŭstralio Ĉinujo Usono

Estontaj problemoj por Aŭstralio

La perdo de ĉina mono kontraŭos la bonstaton de Aŭstraliaj civitanoj

Ĉu la agoj de la parlamento estas konvenaj en la nuna mondsituacio?

**Roger Springer**



Eltiraĵoj el la retejo *Greenvillepost* pri Aŭstralio. (ne la kutima fonto de novaĵo en Aŭstralio) .

<https://www.greenvillepost.com/2020/08/11/australia-the-working-of-the-american-imperial-hand-2/>

“Aŭstralio nuntempe luktas pri sia nun-kronika dilemo: kiel ekvilibrigi siajn rilatojn kun la obstina kaj nefidinda Ameriko de Trump, kaj ĉiam pli kolera komerca partnero Ĉinujo.”

“Sur la politika nivelo, Morrison kaj liaj ministroj ĉiutage fosas pli profunde la truon en kiu ili estas, tro fieraj por pardonpeti al Ĉinio pro sia agresema mallerteco.”

“La usoninklina aŭstralia politika-strategia elito daŭre agos kontraŭe al la propra intereso de Aŭstralio.”

## Grandega imperia defenda armeo.

Bezonas malamikojn, profitojn Jen la monda problemo. **Roger Springer**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## Ĉu vi kuraĝas korekti vin mem?

### KOREKTECO .

Ĉu vi estas kelkfoje korekta? Ne, vi neniam estas korekta, ĉar vi ne laboras en ĵurnalo korektante.

Ĉu vi estas korekta? Ne, ĉar vi ne laboras en korekta instituto por krimemaj junuloj.

La korektisto en ĵurnalo nur tre malofte ne estas ĝusta kiam li estas korekta.

Vi laboras en korekta instituto kaj vi kelkfoje estas ne ĝusta sed ĉiam korekta.

La laboro de tiu instruisto estas neniam malĝusta sed ofte korekta.

Mia laboro kiel gramatikisto estas kelkfoje malĝusta kiam ĝi estas korekta.

Ŝi traktas la maljunulojn ĉiam ĝuste sed neniam korekte.

Ĉu vi estas ofte korekta? Ne, ĉar vi ne laboras en korekta domo.

Ĉu vi iras hejmen al la korekta domo? Ne, kompreneble ne, ĉar mi ne loĝas tie.

Vi aĉetis dek-du da ili, sed ricevis nur dek. Reiru al la butikoj por ricevi la korektan (= korektita) kvanton. Tio estas evitinda uzo de “korekta”: uzu “korektita”.

*Marcel Leereveld.*

### PLI DA GRAMATIKAJ SEKRETOJ .

Ni spionu kelkajn pliajn.

La klara regulo estas, ke oni povas fari la Pasivan Voĉon nur el de la (Rekta) Objekto de frazo kun Transitiva Verbo. Ĝuste! Do el de ĉiu frazo kun Objekto? Jes, sed la parolantoj ne ŝatas fari Pasivan frazon el ĉiuj transitivaj verboj. Ekzemple oni ne ŝatas diri, kvankam ĝuste, “La suno ĉirkaŭiras de la tero” el “La tero ĉirkaŭiras la sunon”. Nek “Ĝia biciklo prenatis (malnove “estis prenata”) de la infano” el de “La infano prenis sian biciklon”, nek “La horo montratos (estos montrata) de la horloĝo” el de “La horloĝo montros la horon”, kvankam ĉiuj ĝustas gramatike. Do kelkfoje la signifo decidas, ĉu oni uzas la Pasivan Voĉon eblan.

Oni normale nek kreas la tamen ĝustajn Pasivajn Voĉojn el Aktivaj verboj kun Infinitivo kiel Objekto: “Hejmen iri decidatis (estis decidata) de ni” nek “Testi la vinojn permesatis al ni”. Kaj certe ne la malĝustajn “Baldaŭ reveni volatas de ni” nek “Atendi devatis de ni” ĉar la modaj helpverboj estas netransitivaj.

Sed ĉu vi sciis, ke vi povas fari Pasivan Voĉon el Aktiva Voĉo de Netransitiva verbo kun Adjekta Prepozitivo? Por tio vi faru jene: La Aktiva frazo estas “Ni loĝas en kabano”. Vi ŝanĝas “loĝas en kabano” al “enloĝas kabanon”, ĉar nun “kabano” fariĝis Objekto de la transitiva verbo “enloĝi”. Alia ekzemplo: El de la Aktivvoĉa “Ni piediris sur tiu alta monto” ni kreas la Pasivvoĉan “Tiu alta monto piedsuriratis (estis piedsurirata) de ni”. Plurajn tiajn la Esperantistoj ne ŝatas kaj do ne uzas, ekzemple: “La malgranda lito endormatis (estis endormata) de ni” nek “La benko surripozatis de ni”. Nek “Romo enestatis (estis enestata) de mi” el “Mi estis en Romo”. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**LA KORONVIRUSO .**

Preskaŭ ĉiuj infektoj okazas, ĉar homoj ricevas permeson devigi sin mem resti nealireblaj sed ne obeas tion kaj vizitas aliajn homojn. Ili estas kulpaj kaj bezonas punati pro tio. Ili kaŭzas, ke la oficialaj instancoj devas serĉi la multajn eblajn infektitojn. Sed la aŭtoritatoj forgesas serĉi la eblajn infektojn en la sekvaj kazoj, ĉiuj tre maloftaj sed povantaj kaŭzi multajn infektojn.

1). Ekzistas en la socio unu aŭ du homoj kun la malsana deziro kaŭzi arbarfajron. Devas ekzisti unu aŭ du homoj kiuj same malsane deziras kaŭzi koronavirusajn infektojn. Ili sendube estas ege malmultaj, kaj krome devas havi la preskaŭ neblan ŝancon, sed nur unu sukcesinto povas kaŭzi multan malbonon.

2). Ekzistas homoj, ne tro malmultaj, kiuj ŝatas ke aliaj homoj ricevu malsanon aŭ malbonan ŝancon se ili mem ankaŭ ricevas tiun malbonan ŝancon. Kelkaj el ili penas infekti aliajn intence.

3). Por kelkaj komercistoj la pandemio povas doni valoran profiton.

4). Pro iu ajn tialo, iu lando deziras puni Aŭstralion. Ĝi facile trovos manierojn por ensendi.

Ĉiu el la kvar ebloj estas ege neverŝajna, sed tamen ebla. Kaj oni bezonas ricevi nur unu aŭ du tiajn atakojn, por esti gravaj. La aŭtoritatoj ne forgesu pri ili! **Marcel Leereveld.**



**Se vi ne laboras, vi ne manĝas.** La homaro ne plu bezonas tiun ideon.

**Universala baza enspezo (UBI)****Por pli kontentiga kaj sekura mondo**

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo.

**Tio helpas solvi multajn problemojn de la tuta homaro**

Eĉ multaj grandaj/malgrandaj kapitalistaj entreprenoj nun dependas je registara (socialisma) mono por sia estonta daŭro. Do subtenu la socialisman UBEan sistemon. **Roger Springer**

**KRONVIRUSAJ BONFAROJ**

Ni ĉiuj scias iom pri la teruraj malbonaĵoj kiujn la kronviruso-19 jam trudis al la homaro. Sed, laŭ la maksimumo "Estas aĉa vento kiu blovas nenian bonon al iu ajn", ni povas eble feliĉiĝi iomete pro tio, ke "*Carbon Brief*" (analiza grupo bazita en la Unuiĝinta Regno, kiu disdonas informaĵon sciencajn kaj politikan koncerne klimato-ŝanĝon) sugestas, ke la pandemio povus redukti CO-2 eligaĵojn per 1600 milionoj da tunoj ĉi-jare, t.e. ĉirkaŭ 5.5% de la tutaj terglobaj eligaĵojn dum 2019. Tio signifas etan redukton de la homara piedspuro je pluraj eko-sistemoj: polucio malkreskas kaj la aero pli puriĝas (pro malpli da veturiloj kaj industriaj malpuraĵoj), sovaĝbestoj pli multiĝas kaj plantoj ankaŭ profitas. 😊😄

**Vera Payne.**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



Group by [Universala Esperanto-Asocio](#)

## UEA - Universala Esperanto Asocio

informis AEon **Petro Danzer**

Public group, 2.5K members

<https://www.facebook.com/groups/Universala.Esperanto.Asocio/permalink/1744356795730296/?sfnsn=mo>



**3ZZZ** La elsendo de la 17a de aŭgusto 2020 proponas pliajn informojn, pensojn, reagojn, rilate la pandemion kaj anekdotojn pri Stefan Maŭl ,rakontitajn de lia filino Betti Maŭl. .

Mi ricevis atentigon de la kasisto de la radio 3ZZZ . Pro la pandemio , mi supozas, multaj el la membroj ne renovigis sian membrecon kaj nun mankas kvarono da membroj. Mi provos sendi individuajn invitojn al remembris kaj esperas ke la ricevontoj pozitive reagos.

Nun eblas pagi rete irante al la adreso [www.3ZZZ.com.au](http://www.3ZZZ.com.au) .  
Mi antaŭdankas vin.

Kvankam kelkaj homoj disvastiĝis ke BBC anstataŭas nian elsendon, tio tute ne ĝustas. Regule, ĉiun lundon, estas elsendita nova programo.

**Franciska Toubale**




**2020 ONLINE Membership Drive**

**Dates: 15 Aug – 15 Sep**

During this difficult time most of our programs are still producing new content every week.

**Great Prizes up for grabs**

**Your Support is the life Line of the Station !!**



[www.3zzz.com.au](http://www.3zzz.com.au)

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**